

Jesuo Samariano

La Kristo de Johano

Enkonduko

Jesuo ne estas kiel Dio

Por multaj homoj, en la pasinteco, la Eklezio eraris akalkulinte inter la kanonaj Evangelioj ankaŭ tiu laŭ Johano. La malfidemo al teologio tiom malsama disde tiu de la aliaj evangeliistoj, pro la radikala kontraŭstaro al ĉiu formo de religia institucio kaj al la templo mem (Joh. 4,21), kaj, krome pro la akcepto de la herezaj samarianoj, ne nur hidigis por la Judoj la komunumon naskiĝinta el la Evangelio laŭ Johano, sed igis ĝin suspektinda je la okuloj de la naskiĝanta Eklezio.

Sub la papregado de Zefirino (199-217) estis eĉ homoj kiuj, kiel la roma pastro Gaio, malakceptis la Evangelion atribuant ĝin al hereza Cerinto. Fakte la plej malnova komentario pri la Evangelio laŭ Johano estis skribita de Erakleono, disĉiplo de Valentino kaj fondinto de iu konata gnostika sekto.

La Evangelio laŭ Johano, fakte, estis akceptita de gnostikuloj kaj de hereziuloj, sed ĝi estis malfide rigardata de la ekleziaj medioj plej ortodoksaj, kiuj suspektis ke ĝi estas kontraŭinstitucia Evangelio, kiu distanciĝas el la hierarkia strukturo kiu ekformiĝis en la Eklezio.

Fakte la komunumo de Johano konsistas el “ŝafaro kaj Paŝtisto” (Joh. 10, 16); la ekzisto de la kredanta komunumo (ŝafaro) entenas en si mem la ĉeesto de la Sinjoro (paŝtisto) kaj formas la novan sanktejon el kie radias la amo de Dio al la tuta homaro (Joh. 17,22-23).

La tasko de la komunumo-sanktejo estas iri renkonten al la homoj forpuŝitaj el la religia institucio (Joh. 9,22.35; 12,42; 16,2) kaj akcepti kiujn pro ilia kondiĉo sin sentas malindaj alproksimiĝi al la Sinjoro.

Al ĉiuj ĉi la Sinjoro kaj sia ŝafaro resonigas la vorton de la Paŝtisto, invitanta sin unuigi en ununura komunumo en kiu la membroj ne estas servistoj de la Sinjoro, sed liaj amikoj (Jo. 15,15), fratoj inter si (Jo. 21,23), kaj kie validas ununura ordono, tiu de la reciproka amo (Joh. 13,34).

Taksata kiel malmulte konvena por reguligi la vivon de la kredantoj, tiu laŭ Johano estis prijuĝita kiel “*spirita evangelio*” jam preskaŭ en la jaro 200 fare de Klemento el Aleksandrio (Eŭsebio el Cezareo, *Eklezia Historio* 1,6,14,7) Ĉiela Evangelio por specifa utiligo de la mistikuloj, kaj ne je la eblo de la popolo, tute taŭga por la homoj kiuj estas altiritaj de la ĉielaj aferoj kaj ne por ĉiuj kiuj malpuriĝas siaj manoj per la surteraj aferoj.

Tiel ke la Evangelio laŭ Johano, dum la jarcentoj, estis akompanata de la renomo de malfacila verko, rezervita kiel nutraĵo por spiritaj homoj, tiel oni senefikigis la eksplodan impreson kiun tiu evangelio povas esti sur la vivo de la kredantoj kondukante ilin al la plena libero. (“Vi konos la veron, kaj la vero vin liberigos”, Joh. 8,32).

En tiu Evangelio la komprenemo de Jesuo estas sendube esprimita en la plej profunda maniero ol en la tuta Nova Testamento. Dum, fakte, la aliaj evangeliistoj prezentas Jesuon kiel *La Difilon* (Mt 14,33; Mk 1,1; Lk 1, 35), Johano estas la ununura kiu atribuas la terminon “*Dio*” al Jesuo (Mia Sinjoro, kaj mia Dio!”, Joh. 20,28).

Sed kia Dio?

“Neniu iam vidis Dion;” deklaras sendiskute Johano (Joh. 1,18; 5,37; 6,46) invitante la kredanto fiksiĝi nur sur Jesuo, la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris.” (Joh. 1,16). Kiam Filipo demandos al Jesuo montri al li la Patron, Jesuo respondos :” Tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron” (Joh. 14,9). Por Johano Jesuo ne estas egala al Dio, sed Dio estas egala al Jesuo.

La evangeliisto invitas la leganton seniĝi ĉiu bildo aŭ koncepto pri Dio ne trovintaj kongruojn en la persono de Jesuo, en Lia vivo kaj en Lia instruado.

Ĉiu bildo de Dio, kiu naskiĝis el la religia tradicio, el la spiriteco, kiu ne kongruas kun Jesuo estas forpuŝinta, ĉar ĝi estas nekompleta, limigita aŭ malvera.

La Dion deklarita de Jesuo oni povas kon nei pere de la doktrino, sed pere de Liaj agoj (“Kredu al mi, ke mi estas en la Patro, kaj la Patro en mi; aŭ almenaŭ kredu al mi pro la faroj mem.” Joh. 14,11).

La ununura normo pri la vereco rilate la diecon de Kristo estas iliaj faroj, la samaj de la Patro.

Kaj la agoj de Jesuo estas ĉiuj favoraj al la homo, al lia vivo kaj al lia feliĉo.

Pere de la temaroj de la Kreado (*Genezo*) kaj de la Liberigo (*Eliro*), Johano prezentas Jesuon kiel la plenan efektivigon de la esperoj de la malnova alianco. Fakte Kristo estas anoncita kiel pleneco de vivo kaj de lumo. (“En li estis la vivo, kaj la vivo estis la lumo de la homoj.” Joh. 1,4).

En sia verko la evangeliisto prezentas progresadon de tiu vivo kaj de tiu lumo “kiu lumigas ĉiun homon” (Joh. 1,9), pere de agoj kiuj redonas, komunikas kaj riĉigas la vivon al ĉiu homo sendepende de liaj morala aŭ religia kondiĉoj.

La vivo- lumo, kiun Jesuo transdonas, estas plena respondo al deziro je pleneco de vivo kiun ĉiu homo kunportas en si mem, kaj ĝi disvastiĝas ĉiam pli kaj ĝi “brilas en la mallumo,” (Joh.1,5), liberigante definitive la homojn el la regado de la mallumo-morto.

Tiu progresado de lumo iumomente estos tiel preskaŭblindiga ke ĝi estos neeltenebla por tiuj kiuj vivas en la mallumo (Joh.3,20) kaj ili mem estas mallumo: la ĉefreligiuloj.

Fakte estos tiuj ĉi kiuj ne eltenos la lumintenson kiu emanis el Jesuo, la viro-Dio, “Lumo de la mondo” (Joh.8, 12;9,5), kaj ili ekkrios al Pilato: “Forigu! Forigu!, Krucumu lin!” (Joh. 19, 15).

“Kiu forportas la pekon de la mondo” (Joh. 1, 29) estis forigita el la mondo fare de la kunkulpuloj en tiu ĉi peko: la filo de Dio ne mortis por ke tiu estis la volo de la Patro, sed pro la profito de la reganta pastra kasto (Jo.11, 50).

La frenezeco de la Mesio

Laŭ Johano en Jesuo, la Viro-Dio, manifestiĝas la pleneco de la Patra amo, Dio-Amo kiu ne rivalas kun la homo, sed estas lia aliancano, kiu ne lin regas, sed lin pliriĉigas, ne lin ensorbas sed kunfandiĝas kun la homo por komuniki al li la plenan de sia dia vivo (Joh. 17, 22). Li estas Dio kiu ne petas oferojn ĉar estas Li kiu sin oferas (Joh. 4,10), li ne volas esti servita ĉar estas Li kiu servas la homojn (Joh. 13,14), Li petas de la homoj novan rilaton kun Li, ne ja kiel servistojn, sed kiel filojn.

Tiu ĉi ofero ne estos akceptita kaj la Kristo, tiom longe atendita estos rifuzita, malaprobata, kalumniita kaj, finfine, Li estos mortigita (Li venis al siaj propraj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis. “, Joh 1, 11).

La Dia volo ke ĉiu homo fariĝu Lia filo (Joh. 1,12) fakte estos konsiderita kiel blafemaĵo, kiel krimo inda je mortigo fare de la religiaj aŭtoritatuloj, kiuj forĵetos Jesuon kaj Sian mesaĝon je la nomo de la Dia Leĝo:” Ni havas leĝon, kaj laŭ tiu leĝo li devas morti tial, ke li pretendis esti Filo de Dio.” (Joh. 19, 7).

Sed por la evangeliisto la *Leĝo de Dio* ne ekzistas: “Dio estas Amo” (I Joh. 4,8) kaj la amo ne povas sin esprimi pere de leĝoj, sed nur pere de agoj kiuj komunikas vivon al la homoj.

Inter la amo de la Patro kaj la Leĝo de Dio ne eblas iu ajn akordiĝo. Por Jesuo la Leĝo vokita de la ĉefoj de la popolo ne estas io alia ol malplena ujo kiu malkaŝas la pretendon pri regado kaj povo fare de la religiaj aŭtoritatuloj: pruvo pri tio estas ke ili neniam alvokis la Dian leĝon pro la popolo sed ĉiam je propra avantaĝo (Joh.7,19).

La Dia Leĝo estas uzata de la ĉefreligiuloj por defendi ŝanceliĝantajn teoriojn kredigante ilin kiel se ili estus dia volo, por opresi kaj maŝtraci popolon kiu ne povas sin permesi alian opinion ol tiu de la ĉefreligiuloj mem (Joh.7,48).

Jesuo neniam rilatiĝas al la Dia Leĝo, Li ĉiam rilatiĝas al la amo de la Patro. Je la nomo de la Leĝo, eĉ se ĝi estas tiu dia oni povas suferigi kaj eĉ mortigi la homojn (Joh. 16, 2), je la nomo de la Patra amo oni povas nur mildigi la suferon kaj redoni la vivon al ĉiu homo.

La aŭtoritatuloj estus povintaj toleri profeton reformanta la religiajn instituciojn, aŭ senditon de Dio por purigi la Templon, la sacerdotojn, la kulton kaj eĉ la Leĝon mem, jam komplikiĝinta kaj neefektivebla, sed Jesuo ne, Li ne estis eltenebla.

Li ne estas profeto nek dia sendito, Li ne moviĝas en la kadro de la sanktaĵoj, sed li foriras el ĝi.

La Kristo estas la revelacio mem de Dio inter la homoj kaj Li ne venis purigi la religiajn instituciojn sed ilin forigi, klarigante ke ĉiu tiu aro de kredoj kaj moroj kiujn oni nomas *religion* ne nur ne permesas la komunecon kun Dio sed ĝuste tiu ĝin malhelpas.

Tio estas troa.

Rifuzita el la familio tiapunkte ke” Liaj fratoj mem ne kredis al li.” (Joh. 7, 5), kaj forlasita el granda nombro de Siaj disĉiploj (“multaj el liaj disĉiploj iris returne kaj lin ne plu akompanis”, Joh. 6, 66), por la judaj aŭtoritatuloj Jesuo estas nur frenezulo, demonhavanto.

En la akuzo de la ĉefoj de la popolo, laŭ kiu Jesuo estas Samariano (“Ĉu ne prave ni diras, ke vi estas Samariano kaj havas demonon?”, Joh. 8,48), ne estas nur entenata la malestimo kiun la hebreoj sentis al tiu popolo nomata *stulta* en la Sanktaj Skriboj (“tiu stulta popolo loĝanta en Sikem”, Sir. 50,26), sed en ĝi estas entenata ankaŭ la akuzo ke Li estas danĝera ulo, malamiko de Dio (demonhavanto) kaj de la popolo (samariano) kiu estas batalinda kaj forpuŝinda.

Nur frenezulo, demonhavanta samariano povis kulpigi la ĉefreligiulojn kiel filojn de la diablo kaj murdistojn (Joh. 8, 44) kaj deziri la finon de la religia institucio kiun oni opiniis volitan de Dio mem. Pro tio kontraŭ la Kristo unuiĝos ĉiuj tiuj fortoj kiuj vidos en la homo kiu pretendis esti egala al Dio.” (Joh. 5, 18) danĝeron por ilia regado, iliaj ambicioj kaj eĉ por ilia sekureco: tiuj estas kiuj faras el religio la metodon por kontentigi proprajn frustrciitajn ambiciojn kaj el Dio faras la piedestalon al ilia deziro je prestiĝo.

Johano skribis sian evangelion “por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en lia nomo”.(Joh.20.31), nin certigante ke la mallumo ne venke sukcesos kontraŭ la lumo (“kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne venkis.”, Joh. 1, 5) kaj invitante ĉiun kredanton aktive kunlabori kun tiu kiu diris:”Mi venkis la mondon” (Joh. 16, 33), ĉar la vivo estos ĉiam pli forta ol la morto.

alberto maggi